

Eŭropa Bulteno

**Sendependa esperantlingva ret-bulteno
por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo**

12an de Decembro 1999. N-ro 2

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri Eŭropa Esperanto-Unio (<EEU-informilo>) kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (<Eŭropa debato>). Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso <u.broccatelli@tiscalinet.it>; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

* * * * *

EEU-Informilo

De: CHARLOT Vincent <esperant@worldnet.fr>

4an de decembre 1999

Jen la stato de la eŭropa kampanjo en Francio:

11 el 87 Francaj eŭropaj deputitoj (12,64%)

GUE - GVL (Komunistoj) 3 el 6 (50%)

PS - PSE (Socialistoj) 6 el 22 (27,27%)

Verduloj - ALE 2 el 9 (22,22%)

Jen listo de apogantoj:

Sylviane AINARDI (PCF - GUE/GVL) reasertis sian apogon kaj deziras kunlabori

Letero 141099

Yasmine BOUDJENAH (PCF - GUE/GVL) apogas kaj deziras sekvi la aferon.

Letero 271099

Gérard CAUDRON (PS - PSE) reasertas sian apogon kaj deziras kunlabori.

Retmesaĝo 071099

Danièle DARRAS (PS - PSE) reasertas sian apogon.

Persona kontakto Claude LONGUEEPEE

Harlem DESIR (PS - PSE) apogas kaj promesis sendi favoran leteron.

Persona Kontakto Vincent CHARLOT 221099

Geneviève FRAISSE (Sendependa - GUE/GVL) apogas kaj petas informojn.

Retmesaĝo 061099

Gérard ONESTA (Verts - ALE) apogas kaj deziras kunlabori.

Renkontiĝo kun Komisiono Esperanto de la Verdanoj 250899

Yves PIETRASANTA (Verts - ALE) apogas kaj deziras sekvi nian aferon.

Letero 230999

Bernard POIGNANT (PS - PSE) milde apogas kaj partoprenos pri minoritataj lingvoj. Letero - 281099

Martine ROURE (PS - PSE) apogas nian agadon.

retaĵo al UFE Novembro 1999

François ZIMERAY (PS - PSE) apogas nian agadon.

Letero al Claude Longue Epée 101199

EŬROPA DEBATO

De: Renato Corsetti <corsetti@itelcad.it>

8an de decembro 1999

<<Mi jes deziras ricevi la E Ŭ R O P A-n B U L T E N O-n.

En la STATUTO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO mi vidis la kialon de mia (kaj ne nur mia) maltrankvilo pri EEU.

>2. EEU celas la kunordigon de la esperantista agado rilate al la instancoj kaj politiko de la Eŭropa Unio.

Tio ŝajnas al mi ege mallargha celo, kaj rekte konfliktanta kun la agado de la Laborgrupo en Bruselo.

Lau mi la celoj de EEU devus esti:

- disvastigi Esperanton en la landoj aliĝintaj al la Eŭropa Unio kaj kunordigi la agadon rilate al la instancoj kaj politikoj de la Eŭropa Unio.

Amike

Renato Corsetti>>

Mia komento estas:

La disvastigo de esperanto en la landoj de EU estas tasko de la landaj asocioj, kaj eventuale de UEA, kie la LA ne ekzistas aŭ ne funkcias.

EEU ne havas proprajn fortojn: ĝi povas agi nur laŭ la mezuro en kiu la LA kunagas. Do mi timas ke la statutaj celoj estas eĉ tro ambiciaj por ĝi!

U.Br. ♦

=====

De: GADOS Laszlo <glaci@elender.hu>

LA ŜANCO DE ESPERANTO EN EŬROPO.

AGADOEBLOJ POR ESPERANTISTOJ.

La suban eksplikon de mia koncepto motivis la informoj pri opinioj en la Eŭropa Bulteno, n-ro 1, decembro 1999 sub la titolo Eŭropa debato. Mi klopodos iom detale klarigi mian koncepton pri la temo: Esperanto kaj Eŭropa Unuiĝo: Ŝancoj kaj defioj.

ĜENERALAJ RIMARKOJ PRI LA EBLA SORTO DE ESPERANTO

Antaŭ ol pritakti la temon pri Esperanto kaj Eŭropa Unuiĝo mi faras rimarkojn pri la ebla estonta sorto de Esperanto konsidere la titolan demandon

de d-ro Tazio Carlevaro: Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?

Unue, la vivo, la ekzistado de Esperanto kaj la grado de ĝia disvastiĝo estas du malsamaj aferoj. La favoraj ecoj de Esperanto motivos homojn por eklerni kaj uzi ĝin antaŭ 2045 kaj ankaŭ poste. Esperanto kontentigas ekzistantajn homajn bezonojn kaj servas homajn interesojn. Tio ne dependas de tio ĉu la "fina venko" havas ŝancon aŭ ne, ĉu la angla estos mondlingvo aŭ ne. (Ankaŭ ĝis nun ne malmultaj homoj lernis kaj uzis/uzas Esperanton sen la kredo de la fina venko.) Tute alia demando estas tio, ke en iu tempo kaj loko la bezonoj je Esperanto en kiuj kaj kiom vastaj homaj rondoj estiĝas. Tio dependas de multaj faktoroj. La pritaktado aŭ debato pri la dependeco havas sencon, sed ne la malapero de Esperanto.

Due, la procezo de la malapero de etnaj lingvoj ne povas esti valida por Esperanto. La malapero de etna lingvo komenciĝas pro tio, ĉar por la parolantoj (de tiu etna lingvo) alia lingvo iĝas pli grava por esti sukcesaj. Kompreneble se la komunumo trovas al si la gepatran lingvon grava kaj tial defendas sin kontraŭ la malapero de la gepatra lingvo, tiukaze tia procezo ne okazos. Sed individuo, ano de la komunumo ĝenerale povas fari ege malmulton kontraŭ la estiĝo de la procezo, la komuna sinteno estas la decida povo. Cetere la gepatra lingvo por la individuo estas ricevita kaj ne elektita. Konsidere Esperanton la situacio estas tute alia. Almenaŭ ĝis nun Esperanton la homoj elektis al si mem kaj havis/havas ĝin krom la gepatra lingvo. Ĝis kiam ekzistos kelkaj homoj, kiuj elektos al si Esperanton, tiu ĉi lingvo restos eĉ se la angla estus tute venkanta. Do la ekzistado de Esperanto estas sendependa de la angla, sed ne estas tia la pozicio de Esperanto inter la lingvoj.

ĜENERALAJ RIMARKOJ PRI LA PLENUMEBLAJ ROLOJ DE ESPERANTO

La plenumebraj roloj de Esperanto dependas de la bezonoj kaj la interesoj de la homoj. Kaj la bezonoj kaj la interesoj je internacia komunikilo estas strukturitaj kaj hierarkigitaj. Oni povas distingi almenaŭ du tipajn bezonojn je internacia komunikilo: abstraktan kaj konkretan. La abstraktan bezonon oni povas klarigi per ĝeneralaj, abstraktaj argumentoj. Tia bezono ne estas

pruvebla per konkretaj faktoj. Ekzemple, malantaŭ la ideo de la "fina venko" estas tia abstrakta bezono. Por kompreni, kial ĝi ne reprezentas konkretan, efektivan bezonon, oni pripensu tion, ke en la mondo vivas plurcent milionoj da homoj, kiuj tute ne havas kaŭzon, bezonon por lingve komuniki kun alilingvanoj. Povos okazi ke tia bezono signife kreskos, disvastiĝos (ekzemple pro la efiko de la tutmondiĝo), pro tio oni ne ekskludu la ideon de la "fina venko" sed rigardu ĝin laŭ la aktuale ekzistantaj bezonoj.

Konkretajn bezonojn oni trovas tie, kie diverslingvanoj efektive devas aŭ volas lingve interkomuniki unu kun la alia. Do por ni estas konsilinde ke ni ekzamenadu la eblajn rolojn de Esperanto kaj la angla laŭ tiaj konkretaj bezonoj kaj konsidere diversspecajn interesojn, pri kiuj en la sekvontaj linioj pli detale okazos klarigo.

Tuŝante la aserton: Vetu por Esperanto kontraŭ la angla estas riska veto - mi demandas: por kio ni devus veti por Esperanto kontraŭ la angla? Ni devas rigardi la konkretajn eblojn por Esperanto kaj agi laŭ tiuj ne zorgante pri la angla. Ni devas malkovri la konkretajn bezonojn, kiujn kontentigi per Esperanto estas plie intereso por la homoj ol fari ĝin per alia ilo. Se ni kapablos pruvi al la homoj iliajn verajn interesojn, ili elektos al si ankaŭ Esperanton. (Se Esperanto akirus oficialan socian rolon tiukaze ĝia pozicio por vetkurado ŝanĝus radike sekve ĝiaj favoraj ecoj.)

KIAL ESTIĜAS ŜANCO POR ESPERANTO EN EŬROPO?

Laŭ mia koncepto la disvastiĝo de Esperanto estas limigita al homaj bezonoj, kiuj povas esti individuaj, grupaj kaj sociaj (sociodimensiaj). La ĝis nunan disvastiĝon de Esperanto karakterizas kontentigo de individuaj kaj grupaj bezonoj. En la historio de tiu lingvo nur sekve de la Eŭropa integriĝo estiĝas tia sociodimensia bezono en kies kontentigo Esperanto povus havi rolon. Estiĝo de tia bezono povas okazi tial, ĉar en la Eŭropa integriĝo temas pri memvola, paca integriĝo kun la samrajteco kaj protektado de la kultura identeco de la membroŝtatoj. Laŭ la samrajteco kaj la protektado de la kultura identeco signifas ankaŭ la samrajtecon kaj la protektadon de la naciaj lingvoj.

La disvastiĝo de la Eŭropa Unio estigas lingvan problemon ĉe la (ĉefaj) institucioj de la Unio. Do ĝi estigas efektivan bezonon por uzi ankaŭ komunan lingvon (almenaŭ kiel pontlingvon). La alternativo por solvi la problemon: elekti nacian lingvon, malobservante bazan principon aŭ elekti neŭtralan planitan lingvon, ekzemple Esperanton,

Por ke la civitanoj de la Eŭropa Unio havu ĉiun kondiĉon por eluzi la rajtojn, kiuj validas por ili en la tuta Eŭropa Unio, ankaŭ komuna lingvo estus bezona por ili. La alternativo por la solvo estas la sama kiel supre.

En tiu situacio Esperanto povas havi iom da ŝanco en la solvo de la lingvoproblemo. Nia demando: kiamaniere, per kiaj agadoj ni povus altigi la ŝancon de Esperanto. Antaŭ ol ekzameni tiun demandon mi faros intermetitajn rimarkojn konsidere opiniojn pri la speco de la eŭropa integriĝo.

INTERMETITAJ RIMARKOJ

a) Teorie la prezentado de d-ro Chiti-Batelli pri la federacia Eŭropo estas akceptinda, tamen "la diablo kaŝas sin en la detaloj" kiel diras la hungaroj. Tial tiujn detalojn oni devus malkovri kaj pritakti por ke ili estu pli digesteblaj por la homoj. Cetere, la sorto de Esperanto ne estas tiel strikte ligita al la akcepto de la federacio, kiel ĝi estas supozita far de d-ro Broccatelli.

b) Eble oni vere faros fortan eŭropan komunan armeon. Sed ĉiu devas scii: la komuna lingvo de tiu armeo estos nepre la angla. Tio sekvas el la fakto, ke tiu armeo estos estigita en la kadro (sed almenaŭ en forta influo) de NATO. En la militforto de NATO la uzata komuna lingvo estas kaj restas ĉiam la angla.

LA SINTENON DE LA HOMOJ INFLUAS INDIVIDUAJ KAJ KOMUNAJ INTERESAJ

En la plua eksplico mi eliros el la sekvaj frazoj, citataj el la Bulteno:

".., Carlevaro klarigas ke li ja bone vidas ke konsekvenco de la venko de la angla lingvo estos la iom-post-ioma malkresko kaj fine malapero de la ceteraj naciaj lingvoj, sed li aldonas, ke tia perspektivo ne estigos senteban kontraŭstaron, ĉar la procezo okazos malrapide, paŝon-post-paŝo, tiel ke la plej multaj homoj preskaŭ ne perceptos ĝin aŭ finfine ne donos al si zorgojn pri tio, ĉar la individua intereso estas enmeti sin en la fluon de la tutmonda lingvo, por ĝui personan avantaĝon."

"La diagnozo kaj la prognozo de Carlevaro estas, ĉe la nunaj kondiĉoj, nerefuteblaj. La Esperanto-movado tute ne havas la forton renversi la fluadon de la historio. La angla lingvo havas malantaŭ si la forton ekonomian, politikan, kulturen de Usono. Esperanto havas malantaŭ si nenion." [Ĉi tie nur en parantezoj mi rimarkas: Se la decidpovaj instancoj de EU akceptus Esperanton kiel oficialan lingvon, tuj estus fortoj malantaŭ ĝi. Do tiun problemon solvus kelkaj decidoj. Cetere ne estas vere, ke Esperanto havas nenion malantaŭ si. Ĝi havas malantaŭ si spiritan kaj moralan fortojn, iaspecan kulturon kaj agademajn homojn.]

Carlevaro pravus en multo en sia prognozo, sed ne en ĉio. Estas prave, ke malfavora procezo okazos se ne okazos ia agado por bridi ĝin. Estas ne prave, ke ne estus ebloj por agadi tiucele. Mi deziras demonstri tiajn eblojn. Por tio ni devas pli profunde ekzameni la problemojn, respektive la agadoblojn.

En la disvatigo de Esperanto la vera celo de Esperanto-movado devas esti, ke homoj, kiuj havas bezonon je internacia komunikilo, uzu ĝin, se ĝia uzado estas pli favora, plie estas intereso al ili ol tiu de aliaj komunikiloj.

Ni vidu, ke la propozicio, post la vorteto "se", povas havi du interpretaĵon:

a) la uzadon de Esperanto ni, esperantistoj trovas pli favora al la homoj; kaj

b) la homoj mem trovas ĝin tia. Por la sukceso de Esperanto en Eŭropo la unua kondiĉo estas, ke la homoj mem trovu ĝian uzadon al si pli favora ol tiun de aliaj komunikiloj.

El mia konatularo la plimulto de ne-esperantistoj diras, ke vere, estus pli bona la uzado de Esperanto sed la kondiĉoj mankas por ĝia vasta internacia uzado. Li aŭ ŝi devas turmenti sin per la angla, ĉar okaze de la internaciaj fakaj konferencoj tiu lingvo estas uzata. Do por mi estas klara, ke la plimulto de la homoj principe akceptus la ideon de la uzado de Esperanto eĉ se ili pro praktikaj kialoj devas eklerni kaj uzi alian lingvon. Ĉi tie temas pri la efiko de la individua intereso kiun menciis Carlevaro. Tamen, estus tre grave, ke la plimulto de la homoj almenaŭ principe vere akceptu kaj apogu la ideon pri la uzado de Esperanto, ĉar tio pozitive influus la pensadon de la decidpovaj politikistoj.

Donas sin demando: Ĉu nur individuaj intereso povas influi la sintenon de la homoj aŭ krom ili ankaŭ komunaj intereso? Mi pensas, ke sen risko ni rajtas aserti, ke ankaŭ komunaj intereso influas la homojn. El tio sekvas ŝanco por ni agadi sukcese por la modifo de la kondiĉoj, kiuj direktas la individuan intereson ĉe la lingvoelekto, ĉar la kondiĉoj estas modifeblaj.

DISVOLVIGI KOMUNAJN INTERESOJN DE LA HOMOJ

En la bazaj dokumentoj de Eŭropa Unio/Komunumo estas principoj kaj postuloj pri la lingva diverseco kaj plurlingveco, pri la respekto de la kultura diverseco de la membroŝtatoj kaj pri la protektado de la kultura heredaĵo.

Rilate tiujn postulojn estas tre verŝajne, ke ties senco ĉe la plimulto de la homoj ne estas detale, profunde klarigita. Tial oni devus starigi kaj ekzamenadi vastan demandaron. Ekzemple: Kiel la nunaj politikistoj de EU klarigas detale la signifon de tiuj postuloj? Kial ili trovas grava tiujn? Kiel ili intencas realigi la postulojn? Kiel la civitanoj de diversaj membroŝtatoj komprenas la postulaĵojn de EU-dokumentoj? Kion ili komprenas sub la nocioj propra kulturo kaj kultura heredaĵo? Kion ili trovas protektenda? Kian valoron signifas la propra lingvo (la gepatra lingvo) al

ili? Ktp.

Per demandado oni devus malkovri la faktojn de la realaĵo kaj direkti la atenton de la homoj al gravaj interrilatoj (ekzemple al la sekvaĵo se iu etno ne zorgas pri la protektado de la propra lingvo). Do, la demandado servus la prezentadon de la komunaj interesoj de la civitanoj de Eŭropo (ene kaj ekstere de EU). Tre verŝajne la prezentado de la reala eŭropa situacio estus grava ne nur por esperantistoj sed ankaŭ por diversaj homoj kaj homgrupoj (en asocioj k.s.), kiuj sentas sin responsa pri la sorto de la kulturo, lingvo, prospero de la propra popolo. Kune kun ili esperantistoj povus akiri sufiĉe signifan efikon en la socio kaj en ĝi ĉe politikistoj.

Kiel fari tion en la praktiko? Ekzemple jene:

Volontuloj el eŭropaj landoj estigu agadreton, kiu konsistu el landaj ag(ad)antoj (eble agadgrupoj) kaj redakta grupeto. La interrilato inter ili povus okazi per poŝto kaj/aŭ retroŝto. La funkciado: la elementoj de la agadreto komune decidas pri la temoj. Ekzemple, la unua temo povus esti: Kia damaĝa efiko trovis la gepatran lingvon en la lastaj du jardekoj?

Post la akcepto de la temo ĉiu landa aganto serĉas aŭtentikan materialon aŭ kompetentulon, de kiu li/ŝi petas intervjuon aŭ materialon. (Kompreneble povas temi nur pri mallongaj, kelkpaĝaj materialoj.) La akiritan respondon la landa aganto tradukas en Esperanton kaj sendas la tradukaĵon al la redakta grupeto.

La redakta grupeto kompilas broŝuron el la materialoj ricevitaj de la landaj agantoj. Multobligas la broŝuron almenaŭ en tiom da ekzempleroj, ke ĉiu aganto povu ricevi unu ekzempleron.

La landa aganto tradukas la ricevitan broŝuron en la gepatran lingvon kaj zorgas pri la multobligo de la tradukita materialo en iom da ekzempleroj, kiuj necesas ĉe la serĉado de kunagontoj. La landa aganto jam havanta la tradukitan broŝuron serĉas kunagontojn (homojn, asociojn, fondaĵojn,

instituciojn, redaktejon ktp) por komune trovi publikan eblon por la konigo kaj pritaktado (debato) de la temo. Ni povas supozi, ke la prezentado de iu temo laŭ la faktoj kaj vidpunktoj de pluraj landoj faciligus por ni la trovon de kunagantoj. La publikan efikon povus fortigi, se la publikaj debatoj de la temo(j) okazus preskaŭ samtempe en multaj landoj.

La kosto de tia funkciado ne estus tro alta, la partoprenantoj supozeble povus zorgi pri ĝi mem, ĉefe se ili trovos monhavantajn kunagantojn.

Ĉi-tie mi haltigas mian fantazion kaj faros iom da klarigoj.

NECESAS AGADI ĈIU-DIREKTE

1. La skizita ideo celas agadon ne anstataŭ la faritaj ĝis nun, sed kompletigi ilin. La ideo eliras el la fakto, ke la plimulto de la homoj zorgas kaj pensadas pri ĉiutagaj problemoj, sekvas modojn, stereotipojn ktp., do ne pripensadas pli profundajn temojn se ili ne ricevas ian impulson por fari ĝin. Alikaze homoj ne emas akcepti aserton, proponon aŭ opinion se ili devus fari longan pripensadon por konvinkiĝi pri ties valido, boneco ktp. Tamen la akcepto eblas se oni iel-maniere ekirigas kaj helpas ilian pripensadon. La skizita ideo pri la agado celas tion.

2. Laŭ mi nepre bezonas, ke esperantistoj agadu, kvankam pripense, en diversaj direktoj.

Vere estas saĝaj iniciatoj la projekto NEIGHBOUR kaj la projekto RELAIS (ambaŭ projekton mi tradukis en la hungaran kaj konigas ilin).

Mi trovas ege utila la agadon de la informgrupo kunordigita de Germain Pirlot.

Tiaj aranĝoj bone preparitaj estas tre gravaj kaj sekvindaj, kiuj ekzemple okazis en Oegstgeest kaj en Caen sub la slogano Kiu(j) lingvo(j) por Eŭropo?.

Oni povas alparoli multajn elementojn de la socio se la direndaĵo en io povas esti aktuale ligitebla al la problemo, programo, agado ktp. de la alparolotoj.

Laŭ tia pripenso ni povis fari, ekzemple, la subajn:

a) Ekde 1995 ĉiujare almenaŭ dufoje HEA sendas okpaĝan hungarlingvan informilon (La Eŭropa Unio kaj la lingva demando) al parlamentanoj, partioj, redaktejoj, kiuj informiloj enhavas informojn pri la lingva problemo, kiujn la celitoj verŝajne ne akirus per aliaj kanaloj. Politikistoj letere plurfoje asertis, ke la ricevitaj informoj estas utilaj por ili.

b) En 1996 la hungara registaro devis prilabori la respondojn al la demandaro de la Eŭropa Komisiono. Ĉi-okaze esperantistoj sendis al la respondeca ministerio leterojn, en kiuj ili atentigas la registaron pri la lingvoproblemo. En tiu situacio la ministerio ne povis neglekti la respondojn. Kompreneble la ministro kaj la ŝtatestretario donis evitajn respondojn, tamen pri la atentigo jam estas spuro en la ministeria arkivo.

c) En 1996 aperis hungarlingva libro en 1000 ekzempleroj pri la Eŭropunia lingvoproblemo kaj en ĝia solvo la ebla rolo de Esperanto (Ĉu interparoli aŭ balbuti en la unuiĝinta Eŭropo?)

ĉ) Krom la ne malmultaj alparoloj en tagĵurnaloj ankaŭ studo aperis en sociscienca periodaĵo sub la titolo: Pri la neceso de pli diferencigita kaj pli unusenca lingvopolitiko, el kiu studo kelkaj ĉapitroj ankaŭ esperantlingve aperis en la revuo Debrecena Bulteno.

d) Pri la lingvoproblemo mi povis interŝanĝi priesencajn leterojn kun la prezidanto de la Hungara Scienca Akademio.

e) Okaze de lingvokonferenco de hungaraj lingvistoj mi povis paroli pri la eŭropunia lingvoproblemo kaj montri taskon por la hungara lingvistiko en konsidero de la lingvopolitiko.

f) Esperantistoj kaj Esperanto-grupoj en diversaj urboj de Hungario iomgrade

iĝis konata kultura faktoro de la loka socio. En la pasintaj monatoj en du urboj ili organizis publikan aranĝon, kie mi havis eblon prelegi pri la lingvoproblemo de la Eŭropa Unio. Kvankam la aŭskultantoj ne estis multaj, sed okaze de la du prelegoj aperis kvin artikoloj en lokaj kaj regionaj ĵurnaloj kaj loka radiostacio dissendis intervjuon dank' al la bonaj interrilatoj kaj preparlaboroj de la lokaj esperantistoj. Ankaŭ en la tria urbo oni jam organizas la publikan aranĝon.

Per la supraj ekzemploj mi volis pruvi, ke temas ne nur pri teoria ideo sed ankaŭ praktiko.

Budapeŝto, la 5an de decembro 1999.

Laszlo GADOS

De G. Pirlot :

<<kara amiko, post la europa konferenco de helsinki nepre e-istoj e.u. kaj en la kandidat-landoj pridemandu 'jurnalistojn kaj politikistojn pri la lingva problemaro. tute ne povos funkcii e.u. kun 20-o da lingvoj kaj limigo je 1, 3 au 4 lingvoj signifus gravegan diskriminacion, tiam estus superaj kaj malsu peraj europanoj lau lingva kriterio, kiel estas diskriminacio lau hauta kriterio. Alia grava demando, 'cu eeu ekfunkciis au 'cu 'gi daure restas surpa pera'jo? samideane kaj europe via, g.pirlot >>

EEU funkcias en la mezuro en kiu la landaj asocioj kunlaboras.

Pri tio mi skribos venontfoje.

<<Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo>>

Hamilton, The Federalist

